

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

### Redakta komitato:

József Németh (red.)

Mireille Grosjean

Luigia Oberrauch Madella

Ahmad Reza Mamduhi

Rob Moerbeek

### Kunlaborantoj

#### de la aktuala numero:

A.A. Alves Filho

Ĵenja Amis

Nina Danylyuk

Alessio Giordano

Vjačeslav Ivanov

Didier Janot

Kimura Goro Christoph

Ivano Kossey

Katalin Kováts

Stefan MacGill

Alessandra Madella

Reza Mamduhi

Stano Marček

Radojica Petrović


Josip Pleadin

Cesco Reale

Penelope Vos

Mihai Trifoi

Kristin Tytgat



## ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) .....	3
<i>Superrigardo pri inkluziva lingvaĵo</i> (Cesco REALE, Alessio GIORDANO) ...	4
KIMURA Goro Christoph: <i>Lingva higieno kaj Esperanto</i> .....	8
Ivano KOSSEY: <i>Lernmetoda komplekso por instruado de E-o en lernejoj</i> ..	9
<i>Teatraĵo „1910“: por instruistoj kaj lernantoj!</i> : (Ĵ. AMIS, A. MADELLA).	12
<i>Kursoj en Senegalo</i> (Vjaĉeslav IVANOV) .....	15
El la landoj kaj sekcioj (AU, BR, BE, CN, HR, RO, NL, RS, UA) .....	19
Alessandra MADELLA: <i>Alice Vanderbilt Morris kaj IALA</i> .....	28
Penelope VOS: <i>Instruu Esperanton al Via Infano, per Mil Unuaj Vortoj</i> .	31
Didier JANOT: <i>Eventa Servo</i> .....	33
Novaĵoj (Katalin KOVÁTS, Stano MARČEK, Stefan MACGILL) .....	34
Informoj pri ILEI, redakciaj informoj .....	36

## ESTRARO DE LA LIGO

- Prezidanto:** Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh. Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <mamduhi@gmail.com>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.
- Sekretario:** Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <lena\_espero@mail.ru>. Lerneja agado.
- Estrarano pri financoj:** Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. <ilei.kasisto@gmail.com> (financoj). Tel. +374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <karinko\_arm@mail.ru>. Ekzamenoj.
- Vic-prezidanto:** Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio, Tel. +39 0521 785582, <a.madella@tiscali.it>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.
- Estrarano pri kongresoj:** Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, IT-58031 Arcidosso (GR), Italio. <laura.brazzabeni@gmail.com>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.
- Estrarano:** Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <mjerkovic@net.hr>. Lerneja kaj landa agadoj.
- Estrarano:** Fernando PITA, Estr. Cel. Vieira 134, bl 3, ap 402; Irajá; Rio-de-Janeiro cep 21220-310, Brazilo. <magisterpita@gmail.com>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram, WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj, observanto ĉe TEJO.
- Estrarano:** Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapablighado.

## *Scienca Komitato*

**Prezidanto: Humphrey Tonkin,**

Usono, University of Hartford;

AdE<sup>1</sup>

**Membroj:**

**Duncan Charters,** Usono, Principia College, Elsah

**Renato Corsetti,** Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza”; AdE<sup>1</sup>

**Probal Dasgupta,** Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE<sup>1</sup>

**Aloyzas Gudavičius,** Litovio, Šiaulių universitetas

**Boris Kolker,** Usono; AdE<sup>1</sup>

**Iona Koutny,** Pollando/ Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu

**Stefan MacGill,** Nov-Zelando/ Hungario

**Aleksandr Melnikov,** Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE<sup>1</sup>

**Radojica Petrović,** Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

**Balázs Wacha,** Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

---

<sup>1</sup> AdE – Akademio de Esperanto

**Sur la titolpaĝo:** Signifo de la ikonoj: „Lingvo sengenra” (vd. la artikolon sur p. 4)

**Sur la dorskovrilo:** Teatraĵo „1910”: por instruistoj kaj lernantoj - fotoj de Tamara Koziej kaj Brian Moon (vd. la artikolon sur p. 12)

## **Enkonduko**

*Karaj legantoj,*

Laŭ mi ege fierindas, ke nia revuo estigas diskutojn kaj diskursojn ĉu ILEI-skale, ĉu pli vaste. Bona ekzemplo estas Lingva Higieno, pri kio prelegis prof F. A. Pennacchietti en VEKI-3, kaj al kies graveco mi aludis en antaŭa numero de IPR, kaj ĉi-numere ni legas reason de d-ro Kimura Goro Christoph pri tio.

Alia fierindaĵo por ni estas okazigo de la ILEI-Forumoj pri la aprobita Laborplano (vd. ĉe [www.ilei.info/instancoj/Grupigita-Laborplano-de-ILEI.pdf](http://www.ilei.info/instancoj/Grupigita-Laborplano-de-ILEI.pdf)), pri kiu vi legis en IPR 2023/1. La unua tia Forumo okazis la 14-an de aprilo 2023 pri la Grupo 5 de la laborplaneroj, kiu temis pri Informado kaj Instruado de E-o. Mi invitas ĉiujn vin partopreni en la postaj tiaj Forumoj, kiuj okazos en la dua vendredo de ĉiu monato ekde la 16:30-18:00 UTC (Zoom-ligilo: <https://us02web.zoom.us/j/84640151378>,

nur se demandite: kunven-identigilo estas 84640151378, kaj pasvorto estas esperanto). En tiu ĉi numero rilate al instrumentoj kaj instruiloj por lernigi nian lingvon, vi povas legi tre diversajn alirojn, ekz-e tiujn de Ivano Kossey (p.9) kaj Ĵenja Amis (p.12).

Se vi deziras vidi kiom sukcese adaptiĝiva kaj fleksebla povas esti instruisto, vi povas legi pri tre interesaj spertoj de Vjaĉeslav Ivanov en Senegalo, Afriko (p.15). Kaj se vi scipovas la anglan kaj deziras lerni E-on kune kun infano, Penelope Vos prezentas novan verkon, kiu tion ebligas utligante la faman libron Mil Unuaj Vortoj (p.31).

Didier Janot prezentas kiel krei retpaĝon por via sekcio en la Eventa Servo <https://eventaservo.org/> (p.33).

Bonan legadon!

*Ahmad Reza MAMDUHI*

# Superrigardo pri inkluziva lingvaĵo

## Intervjuo al Cesco REALE

de Alessio GIORDANO (Universitata Instituto IUSS Pavia)

**Resumo:** Ĉi tiu intervjuo raportas pri la alpreno kaj la disvastiĝo de inkluzivaj lingvaj formoj. Ĉar la tendenco ŝajnas montri ke, en lingvoj kie la debato estas viva, nova inkluziva lingva formo ekfiksiĝas aŭ ekfiksiĝos, Cesco Reale proponas klarigon pri la nuna situacio ĉe kelkaj lingvoj ne nur eŭropaj. La estonteco de tiu nova lingvaĵo dependas ne nur de socikulturaj cirkonstancoj, sed ankaŭ de pure lingvaj faktoroj: en iuj lingvoj (hispana, sveda, Esperanto k.a.) ekzistas solvoj fonetike kaj morfologie sufiĉe bonaj, nome pli facile akcepteblaj, dum en aliaj (franca, itala k.a.) la serĉado estos ankoraŭ longa.

Tiu ĉi intervjuo unue aperis itallingve en Il Chiasmo, reta magazino de Itala Enciklopedio Treccani, en 2021 ([ligilo](#)). Ĝi estis tradukita kaj parte adaptita por la novaj legantoj.


**Bildo:** [Bildo](#) de [KomunIKON – Senpaga por nekomerca uzo](#)



Lingua



italiana



agènere

**Ŝlosilvortoj:** genro, inkludo, lingvo, gramatiko

**Alessio Giordano** estas italdevena publicisto kaj esploristo. Redaktoro de Il Chiasmo, magazino de Itala Enciklopedio Treccani, kaj vicĉefredaktoro de Literatura Foiro, oficiala organo de Esperanta PEN-Centro, kun intereso kuplitaj ĉefe al la lingvaj minoritatoj kaj al kaŭkazologio.



Cesco Reale estas membro de la [Monda Asocio de Poliglotoj](#), [kunorganizanto de la Universala Kongreso de Poliglotoj](#), [kreinto de la Festivalo de Lingvoj „Limbas”](#), [reprezentanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj de Universala Esperanto-Asocio](#) kaj [kreinto de IKON](#), [lingvo de ikonoj/Emoĝioj](#). Li organizis [debatojn pri genraj aferoj](#) inter lingvoj ĉe la Monda Kongreso de Poliglotoj 2021.



### *Klarigoj pri kernaj konceptoj*

**Biologia sekso:** ĝi dependas de kromosomoj kaj de duarangaj fenotipaj trajtoj (ekz. hormonoj, seksorganoj, gonadoj ktp). Anne Fausto-Sterling, en sia artikolo „La kvin seksoj” (1994), rekonas la ekziston de almenaŭ kvin eblecoj: vira, ina, hermafrodita, mermafrodita, fermafrodita. Pro tio leviĝis la demando pri la interseksaj rajtoj, nome pri la socia agnosko de homoj kies kromosoma kaj fenotipa karakterizoj ne respondas al la tipaj vira kaj ina.

**Genra rolo:** ĝi estas la ekstera manifestiĝo de la atribuita genro laŭ la sociaj konvencioj. Oni rimarku ke kelkaj aŭtoroj uzas la nocion „genra esprimiĝo” por indiki la genran rolon, tiel difinante ĉi-lastan kiel la aron da kondukataj normoj de iu specifa genro.

**Genra identeco:** ĝi estas la konscio aparteni al rekonebla socia kategorio.

**Socia genro:** ĝi estas la rezulto de la rilato inter la genra rolo kaj la genra identeco.

**Gramatika genro:** kiel la gramatika kazo kaj la gramatika nombro, ĝi estas gramatika kategorio. Ne ĉiuj lingvoj havas gramatikan genron; Esperanto estas kazo tia. Krom esceptaj klasoj da vortoj, kiel „viro, masklo, patro ktp” kaj „muzo, nimfo, damo ktp”, kiuj prezentas intrinsekan (t.e. esence intiman) genran informon, Esperantaj vortoj estas sengenraj. Spuroj de gramatika genro troviĝas ĉe la 3a singulara persono (li, ŝi) kaj ĉe kelkaj afiksoj (-in-, ge-).

**Seksa orientiĝo:** emocia, romantika, korpa allogo al alia homo, ĝi povas dependi kaj de seksaj karakterizoj kaj de genraj roloj. Ekzemploj de seksa orientiĝo estas: aliseksema (aŭ heteroseksa), samseksema, ambaŭseksema (aŭ duseksa) kaj aliaj.

**Sengenra:** leksemo ne havanta gramatikan genron.

**Neduumulo (aŭ nebinarulo):** persono kies genra identeco estas nek strikte vira nek strikte ina.

---

**Alessio Giordano:** *Kara Cesco Reale, dankon pro via konsento partopreni en ĉi tiu intervjuo. La bezono uzi inkluzivajn lingvajn formojn leviĝis en pluraj medioj. De kie venas ĉi tiuj bezonoj kaj sur kio ili baziĝas?*

**Cesco Reale:** Estas almenaŭ tri situacioj kiuj generas ĉi tiujn bezonojn de inkluzivaj formoj en pluraj lingvoj.

Koncerne la unuan situacion, konsideru du ekzemplojn.

La unua ekzemplo koncernas neduumulojn (ankaŭ nomataj nebinarulojn), t.e. tiuj, kiuj identiĝas nek kiel viro nek kiel virino. Nu, ĉi tiuj homoj povas senti grandan malkomforton en la itala kaj dirante *sono andato* (= „mi iris”, vira formo) kaj dirante *sono andata* (= „mi iris”, ina formo), ĉar ili ne identiĝas kiel viroj aŭ virinoj; tio instigis parton de la neduumula komunumo serĉi alternativajn formojn por sin esprimi.

La dua ekzemplo validas por iu ajn: se oni volas eviti indiki la genron de homo (ekzemple ĉar oni ne certas ĉu uzi viran aŭ inan, kaj oni volas eviti embarason), tio estas tre malfacila, ĉar normale la genro ĉiam estas esprimata en lingvoj kiaj la itala, kaj ne esprimi ĝin estas afero nekutima, se ne entute neebla. Povas okazi, ke, parolante kun homo (precipe en tre juna aĝo), oni povas havi dubojn pri tio, kio estas ties socia genro. Ekzemple, la koncerna persono povus havi klaran inan genran identecon, kaj se la vira estas uzata, ŝi povus senti sin tre ĉagrenita.

Ĉi tiu unua situacio, montrita en la du ekzemploj ĵus priskribitaj, povas esti difinita kiel duumula elektodevigo.

La dua situacio estas tiu, en kiu la singularo vira estas uzata en kazoj, en kiuj la persono ne apartenas nepre al la vira genro. Ĉi tie denove ni vidas du ekzemplojn.

La unua rilatas al la ebleco preparoli homon kies socia genro estas nekonata: *Se iu venos, alportu lin al mi*. La vira gramatika genro povas esti etendita kaj al nedifinitaj personoj („iu”) kaj al difinitaj personoj („la nova kolego, ĵus dungita”, pri kiu la parolanto ankoraŭ nenion scias).

La dua ekzemplo, multe pli diskutata, rilatas al la kazo de roloj kaj profesioj, por kiuj la vira estas uzata eĉ kiam oni scias, ke tiu persono estas ingenra:

*sindaco* (urbestro) aŭ *sindaca* (urbestrino)? *chirurgo* (kirurgo) aŭ *chirurgia* (kirurgino)? El lingva vidpunkto (precipe morfologia) ofte ne estas problemo ŝanĝi la substantivon al la ina formo, tamen multaj homoj pro kutimo aŭ pro aliaj kialoj (ĉi tie ne diskutotaj) preferas ne fari tion.

Ĉi tiu dua situacio estas difinita kiel virgenra singularo etendita.

La tria situacio similas al la dua, sed koncernas la pluralon: por grupo da homoj de nekonata genro aŭ de miksa genro (ne ĉiuj viroj kaj ne ĉiuj virinoj) oni normale uzas la virgenran formon: *tutti quelli* (ĉiuj kiuj)..., *gli italiani* (la italoj) ktp.

Ĉi tiu tria situacio estas difinita kiel virgenra pluralo etendita.

**AG:** *Ĉu ĉi tiuj lingvaj uzoj implicas kaj reflektas ankaŭ aspektojn de alia tipo, ekzemple, psikologiajn kaj kulturajn? Aŭ ĉu ili devas esti rigardataj kiel faktoj pure gramatikaj sen ajna rilato al la socia sfero?*

**CR:** Fakte, multaj homoj konsideras la lastajn du situaciojn (la vira genro etendita) kiel sensignifaj se ni konsideras la sociajn implicojn, kiujn ili havas. Tamen iuj studoj montris la influon de ĉi tiuj problemoj sur la mensaj reprezentadoj de tiuj, kiuj uzas ilin. (Ĉi-sekve, mi uzos la vorton „formo” por indiki la gramatikan genron, opozicie al la socia genro).

Ekzemple, franca studo de 2017 ([Lévy et al., L'écriture inclusive. La population française connaît-elle l'écriture inclusive ? Quelle opinion en a-t-elle ?](#)) raportas la interesajn rezultojn de intervjuo kun specimeno de 1 000 homoj (reprezento de la plenkreska franca loĝantaro); tri subgrupoj estis petitaj (en la franca) citi respektive *deux écrivains célèbres* („du famaj verkistoj” laŭ la etendita virgenra formo), *deux écrivains et écrivaines célèbres* („du famaj verkistoj kaj verkistinoj” laŭ la duobla formo) kaj *deux personnes célèbres pour leurs écrits* („du personoj famaj pro siaj verkoj” laŭ nedifinita formo). La saman demandon oni levis ankaŭ pri televidjurnalisto kaj olimpikaj ĉampionoj. Kompare kun la etendita virgenra formo, la averaĝa nombro da virinoj cititaj en respondo al demandoj kun duobla formo aŭ nedifinita formo demandoj pliiĝis je 46%, tiel montrante ke la etendita virgenra formo pensigas pri la ina genro multe malpli ol la duobla formo aŭ la nedifinita formo. Tiu ĉi problemo ankaŭ alprenas monigeblajn implicojn en la kazo de dungaj anoncoj: tradukistino private komunikis al mi, ekzemple, ke ŝi ricevas multe pli da laborproponoj en *LinkedIn* ĉar ŝi aldonis la vorton „tradukisto” (krom „tradukistino”) al sia profilo, ĉar la plejmulto de la klientoj kutimas serĉi per viraj vortoj.

(*daŭrigota en la numero IPR 2023/3*)

## Lingva higieno kaj Esperanto

KIMURA Goro Christoph (Japanio)



En la tria Virtuala Esperanto-Kongreso de ILEI (VEKI-3), la 29-an de julio 2022, prof. Fabrizio Angelo Pennacchietti faris interesan prelegon pri *Esperanto: valora instrumento por 'lingva higieno'* (videbla ĉe <https://www.youtube.com/watch?v=Ye9TGzhyxSo>, 29 minutojn post la komenco ekas lia 15-minuta prelego).

En socilingvistiko, simila nocio estas konata de la angla lingvisto Deborah Cameron, kiu atentigis al la fakto, ke homoj ne nur parolas lingvon, sed ankaŭ komentas *pri* lingvoj. Ŝi skribas, ke ŝi neniam trovis homon, kiu ne havas kredojn, ke lingvaĵo povas esti „ĝusta” aŭ „malĝusta”, „bona” aŭ „malbona”, pli-malpli „eleganta” aŭ „efika” aŭ „taŭga”. Tiajn prilingvajn sintenojn aperantajn kiel komentoj ŝi nomas angle *verbal hygiene* (Cameron 1995). Ĉar ne temas pri verboj sed pri lingvo ĝenerale, oni povus traduki tion kiel „prilingva higieno”.

Laŭ Cameron, tiaj prilingvaj aktivaĵoj estas tiel esencaj je lingvouzo kiel vokaloj por fonetika strukturo. Surbaze de tiu penso, ŝi kritikis la sintenon ofte videblan en socio kaj lingvistiko, ke lingvo estas „natura” fenomeno kaj lingvoj evoluas nature. Tia lingvorigardo „misprezentas kaj mistifikas nian rilaton kun lingvo kaj la gradon de nia respondeco por formi lingvon” (p. 215, traduko KGC, ankaŭ sekve). „Fakte ni konstante intervenas en lingvo, ĉu subtene al tio, kion ni perceptas kiel nunan staton aŭ cele al io alia” (samloke).

Tiu koncepto de Cameron povas kontribui por rigardi planlingvojn, kiu baziĝas sur intenca interveno, ne kiel strangajn kaj nenaturajn fenomenojn, sed kiel kazojn de evidenta „prilingva higieno”. Do, ankaŭ interlingvistiko, kiu okupiĝas pri tiaj fenomenoj, trovas taŭgan lokon en lingvoteorio laŭ tiu koncepto (Kimura 2001).

Kaj fakte ŝi mencias Esperanton en sia libro kiel rimarkindan ekzemplon de la aserto, ke homoj povas interveni en lingvon (Cameron 1995, p. 18). Sed bedaŭrinde ŝi tute misprezentas la motivon de Esperanto. Ŝi kontrastigas du respondojn al lingva diverseco: Esperanton kiel perfektigon (unuecigo) de lingva sistemo kaj strebojn al lingvaj rajtoj de lingvaj malplimulto (p.29).



Yoshida Naoko korektis en sia magistriĝa tezo skribita en la angla lingvo (Yoshida 1997) la eraron de Cameron kaj surbaze de analizo de tekstoj el la Esperanto-movado montris, ke la Esperanto-movado, kiu strebas al lingva justeco, ne kontraŭas kaj fakte, tute male, kunhavas la saman celon kiel movadoj por lingvaj rajtoj. Ŝi konkludas, ke la Esperanto-movado kiel kolektiva aktivado por interveni en la regantan „lingvoimperisman” lingvan kaj komunikan ordon havas gravan ekzistosencon por la ĝenerala socio pro tio, ke ĝi atentigas al la graveco de la lingva egaleco.

Estus interese kompari tiun difinon kaj koncepton de prilingva higieno kun tiu, kiun prof. Pennacchietti prezentis, por daŭrigi la diskuton pri tio, kiamaniere kompreni la signifon de Esperanto en la hodiaŭa mondo teorie kaj praktike.

### **Bibliografio**

Cameron, Deborah (1995): *Verbal Hygiene*, Routledge.

Kimura, Goro Christoph (2001): „Intentionale Eingriffe in den Sprachgebrauch – Perspektiven und Probleme einer umfassenden Theoriebildung” [Intencaj intervenoj en lingvouzon – perspektivoj kaj problemoj de ampleksa teoriformado], en: Sabine Fiedler kaj Liu Haitao (red.): *Studoj pri Interlingvistiko / Studien zur Interlinguistik*, KAVA-PECH, p. 19-29.

Yoshida, Naoko (1997): *The Esperanto Movement: A Case of Collective Verbal Hygiene for a Fairer Communication Order*. Master Thesis. University of Essex.

## **Lernmetoda komplekso por instruado de E-o en lernejoj**

*de Ivano KOSSEY (Germanio, ikossey@yandex.ru)*

Esperanto ekzistas dum pli ol 130 eventoplenaj jaroj kaj bedaŭrinde nun malrapide ŝrumpas. Eliri el la nuna stagnado eblas nur per amasa instruado. Mi jam ne rememoras, kiu fama persono diris: Tion, kion vi volas atingi en la socio, vi devas semi en lernejo. Ĉar amasa instruado eblas nur en lernejoj. Unua kondiĉo por instruado estas permeso de la landa ministerio de klerigado por instrui Esperanton nefakultative kiel fremdlingvon. Tiuj landoj estas tre malmultaj kaj tio estas granda obstaklo por nia movado. Atingi tiun permeson en ĉiu lando, ĉu granda, ĉu malgranda, estus serioza venko de esperantistoj. Kiel enigi Esperanton en ministeriajn planojn, estas aparte vasta temo, kiun mi ĉi tie ne diskutas. Mi dirus nur, ke indas krei laborgrupon por kunordigi la agadon en tiu direkto. Apenaŭ indas skribi peticiojn al internaciaj organizaĵoj, prezidentoj aŭ similaj potenculoj. Laŭ la multjara

sperto tiuj estas senutilaj. Lernejoj planoj estas kompetento de ministerioj de klerigado kaj laŭ mi estas celkonforme peti sur la nivelo de ministerioj.

Mi ne estas bone informita, en kiuj landoj eblas instrui E-on nefakultative, kiel ekzemple en Hungario. En tiaj landoj ni povas konsideri manierojn por vastigi la nunan modestan geografion de instruado. Unue la lernantoj devas havi lernolibron. Ekzistas amaso da lernolibroj de Esperanto, inter ili tre bonaj. Tamen praktike ĉiuj tiuj lernolibroj estas destinitaj por diversaj kursoj. Lernolibroj por lernejoj havas tute alian specifaĵon. Ili devas konformi kun striktaj postuloj por la amplekso de materialo, proporcioj de ekzerco ktp., havi ekzerckajeron, libron por instruisto, unuvorte ĉiujn signojn, kiujn havas kutimaj lernolibroj de fremda lingvo. La lernolibroj de Esperanto, kiujn mi vidis, tute ne similas al kutimaj lernolibroj de fremdlingvoj por lernejoj. Mi legis pri lernolibro de la svedaj aŭtoroj K. Lörneberg, L. Forsman, K. Randerhed kaj F. Wedlin „Esperanto por gimnazioj”, sed bedaŭrinde ne vidis ĝin. Verŝajne, tiu lernolibro taŭgas por lernejoj, ĉar ĝi estas verkita eksplicite por lernejoj. Aliajn lernolibrojn taŭgajn por lernejoj mi ne konas. Se mi eraras, mi petas pardonon kaj petas sciigi min. Instruisto, kiu entreprenas instrui en lernejo sen taŭga lernolibro, estas tre entuziasma kaj laborema. Ja, tiuj ekzistas, sed malmultaj kaj ĉiuj meritas honoregon.

Por mi tio estas stranga, ke la esperantistoj dum pli ol 130 jaroj de eksterordinara kaj respektinda entuziasmo kaj laboremo ne kreis lernolibrojn por lernejoj en sufiĉaj kvalito kaj kvanto. Mi verkas lernolibrojn por ŝtopi laŭeble tiun truon. La Lern-Metodaj Kompleksoj (LMK) pli-malpli pretaj estas por Rusio kaj Hungario. Mi tradukas ilin nun por Italio. Jen la tabelo por superrigardo:

Lando	aĝo de komenco		lernojaroj	lecionoj ĉiujaraj	lecionoj entutaj
	minimuma	rekomendata			
Rusio	11	12	3	68/68/34	170
Hungario	13	15	2	102/68	170
Italio (preparata)	13	13	3	68/68/34	170

Por ĉiu lernojaroj ekzistas: Lernolibro - Kajeraro por ekzercoj - Gvidilo por instruisto. Krome, ekzistas vortareto kaj komputila disko por ĉiuj lernojaroj. Por la unua lernojaroj destinitas ĉirkaŭ 20 sondosieroj (formato wma) kun ekzemploj de elparolo. Post ĉirkaŭ ĉiuj 17 lecionoj estas provizitaj kontrolaj taskoj kaj lecionoj por analizo de plenumitaj taskoj. Ekzemple, se la lernojaroj enhavas 68 lecionojn (du lecionojn ĉiusemajne), 4 el ili estas lecionoj por kontroltaskoj, 4 por analizo de taskoj kaj diskuto de eraroj kaj 60 „normalaj”

lecionoj. Ĉiu kontrola tasko disponiĝas en la gvidlibro por instruisto en du variantoj.

En ĉiu lernojaro estas kelkaj (minimume du) muzikaj lecionoj. En la muzika leciono la lernantoj lernas unu kanton en Esperanto kaj kantas ĝin. Por faciligi la kantadon kaj kunporti muzikan etoson por ĉiu kanto provizitas dosiero de karaokeo (en formato MIDIo) sur la komputila disko. Preskaŭ ĉiu kanto en Esperanto havas ankaŭ originalan nacilingvan karaokean version. La disko enhavas ankaŭ programon (kiu funkcias bedaŭrinde nur en Vindozo) por ludi karaokeon kun interfacio en Esperanto. La programo montras la tekston kun ĝustaj literoj kaj en Esperanto, kaj en naciaj lingvoj.

Nun kelkaj vortoj pri miaj „sekretoj”. Ĉiuj novaj vortoj troviĝas en la komenco de la leciono. Do ĉiu leciono komenciĝas per novaj vortoj kaj iliaj tradukaĵoj. Tio ebligas kontroli per speciala komputila programo, ĉu ĉiuj vortoj en Esperantaj tekstoj estas konataj por la lernantoj. La programo de kontrolo kontrolas ankaŭ, ĉu novaj vortoj difinitas nur unufoje. Kontroladas ĉiuj tri libroj: la lernolibro mem, ekzerckajero kaj gvidlibro. Fine de la kontrolo la programo kompilas tute aŭtomate la vortareton. Tio ne nur ŝparas amason de tempo, sed disponigas la aktualan kaj seneraran vortareton post ĉiu korektado en la tekstoj. Krome, la programo faras ankaŭ la oftecan vortaron laŭ la tekstoj de libroj. Memkompreneble, la oftecaj vortaroj estas nur sur la komputila disko, ne por eldono.

*Ekzemplo de ilustraĵoj:*



*Vintro (F: Dmitrij Ĉeĥ)  
Instruu min grimpi!*



*Somero (F: Dmitrij Ĉeĥ)  
Ĉu ci estas vere mia amiko?*

La lernolibroj elŝuteblas de la adreso <https://yadi.sk/d/dwkZp18U3SicnC> kiel dosiero ZIP. Post la dispacko la radika dosierujo nomiĝas Multimed\ . En la dosiero Multimed\Enhavo.RTF estas la priskribo de la tuta enhavo. Mi antaŭdankas por ĉiu erar mesaĝo, sugesto, konsilo. Mi dankas al s-ro Jozefo Horváth pro la zorgema kontrollegado de la hungara versio kaj al s-ro Christof Krick pro la zorgema kontrollegado de la germana versio.

## **Teatraĵo „1910”: por instruistoj kaj lernantoj!**

*Dum la UK en Montrealo estis prezentita nova tutlonga originala teatraĵo en Esperanto: „1910”. La teatraĵo temas pri la vizito de Zamenhof al Ameriko (la Internacia Kongreso en Vaŝingtono, la vizito al familianoj de Zamenhof en Montrealo). Kortuŝa travivaĵo, kun muziko, originalaj kantoj en Esperanto, pluraj historiaj bildoj, tute ankrita en nia Esperanto-kulturo kaj -historio. La plena teatraĵo, en profesia videaj kaj sona kvalito, filmita per kvar kameraoj, haveblas rete kaj tute senpage, en la kanalo „Exploring Esperanto”. Alessandra Madella intervjuas Ĵenja-n Amis, la verkinton kaj produktinton de la teatraĵo.*

ĴA: Ĵenja Amis

AM: Alessandra Madella

**AM: Kial „1910” estu interesa por instruistoj kaj lernantoj?**

ĴA: Multaj kialoj! Unue, laŭ mia scio, ĝi estas la unua kaj la sola plenlonga teatraĵo en Esperanto havebla rete! Due, ĝi havas modelan prononcon en Esperanto – ĝi estas perfekta kaj por komencantoj kaj por homoj de ĉiuj niveloj! Trie, ĝi havas subtitolojn – ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en la angla, franca kaj la hungara (baldaŭ aldoniĝos la hispana!). Kvare, lernantoj povas spekti ĝin solaj (eĉ komencantoj, danke al la subtitoloj!), sed vi povas ankaŭ spektigi ĝin en la klaso; la video estas dividita je sekcioj, kaj oni povas uzi ĝin ankaŭ dum kelkaj lecionoj aŭ eĉ krei progresantan kurson surbaze de ĝi! Kvine, la teatraĵo estas originala – ne tradukita – kaj la temo de la teatraĵo estas nia, Esperanta historio. Ĝi estas plene ĝusta historie, kaj temas pri la veraj eventoj de 1910 kaj la vera vizito de Zamenhof al Ameriko – vi povas nomi ĝin „dokumenta teatraĵo”. La spektantoj kvazaŭ revivas la eventojn de tiu grava jaro, per la vortoj de s-ro Mann, kiu rakontas pri la evento. Mi certas, ke eĉ la plej spertaj esperantistoj lernos kelkajn novajn aferojn pri

Esperanto kaj pri Zamenhof el la teatraĵo! Sese, la rakonto estas absorba kaj engaĝa por la spektanto – ĝi ja estas interaga, multmedia teatraĵo, kun demandoj de la publiko, pluraj historiaj bildoj, muziko kaj kantoj en Esperanto (cetere, ankaŭ originalaj – kaj ankaŭ perfektaj por instruado kaj kunkantado klase)! La liston oni eble povas daŭrigi, sed eble sufiĉas por momento. Mi, certe esperas, ke tiu ĉi teatraĵo fariĝos unu el la nepraj lerniloj por ĉiuj, kiuj instruas kaj lernas Esperanton!

***AM: Ĉu vi planas aldoni pliajn subtitojn?***

ĴA: Jes, venos baldaŭ la kvina lingvo. Mi, certe ŝatus, ke aliaj lingvoj aldoniĝu: belus, se aperus subtitoj ankaŭ en la itala, por la kongresoj de somero 2023. Certe, mi invitas ankaŭ aliajn lingvojn – belus havi subtitojn en ne nur hind-eŭropaj lingvoj, sed ankaŭ, ekzemple, en la ĉina, la japana ktp. Se iuj el vi interesiĝas aldoni subitolojn en aliaj lingvoj, bv. komuniki kun mi mem aŭ Alex Miller.

***AM: Ĉu vi havas aliajn planojn pri la teatraĵo?***

ĴA: Kiam oni faras tian kolosan laboron, por produkti plenlongan teatraĵon, kaj de tia kalibro, kun viva muziko, oni certe volas, ke ĝi okazu pli ol unu fojon. Do, mi volas, ke S-ro Mann revenu sur la scenon, en konvena tempo. Mi ankoraŭ ne scias, kiam, kaj ĉu kun la samaj partoprenantoj, sed, certe indas, ke esperantistoj revidu lin!

Mi volas aperigi ankaŭ la libron „1910”. Ĝi enhavos la plenan tekston de la teatraĵo kaj la rekomendojn por la aktoroj – tiel ke ankaŭ aliaj kluboj kaj landaj asocioj povu produkti la teatraĵon. Krom tio, la libro havos ne nur KD-on kun la filmo, la spektaklon mem, sed ankaŭ diversajn kulisajn intervjuojn kun la aktoroj kaj plurajn ekskluzivajn momentojn de la produktado.

***AM: Kion vi lernis pri la vizito de Zamenhof al Montrealo el la rakonto de S-ro Mann?***

ĴA: El la rakonto de s-ro Mann eliris ankaŭ esplora projekto pri Montrealaj Zamenhofoj – tiuj kelkaj familioj, kiuj bonvenigis la Majstron en 1910 kaj loĝigis lin en la plej luksan hotelon de la urbo. La spurojn de kelkaj el tiuj homoj oni trovas tie kaj jene – ekzemple, iuj eble memoros la tutan historion de konfuzo inter la du preskaŭ sam-aĝaj samnomuloj – la du Ludovikoj Zamenhofoj, kiuj estis unuaj kuzoj. Unu (la nia) estis bona lernanto kaj la alia ne nur ne estis aparte studema kaj forlasis la lernejon, sed eĉ intencis konvertiĝi al kristanismo! Do jen, tiu ĉi dua Ludoviko translokiĝis al

Montrealo en la 1880-aj jaroj. Kaj same translokiĝis lia onklino, en kies domo oni kantis la himnon de pra-Esperanto: *Kadó, kadó, jam temp' está!* Ni sukcesis trovi ĉiujn amerikajn Zamenhofojn (aŭ, eble, mi diru Samenhofojn, ĉar tiel oni literumis iliajn nomojn), ekscii, kie ili loĝis, kion ili faris, kiam ili mortis kaj kie ili estas entombigitaj. Fakte, ni trovis absolute ĉiujn homojn, kies nomoj estis menciitaj en la artikolo de s-ro Mann! Tio estas jen plia kontribuo al la sciaro pri la Zamenhof-familio.

***AM: Ĉu ni povus ie detale legi tiujn informojn?***

ĴA: Ni ankoraŭ faras esplorojn, sed mi intencas, ke la libro kun la teatraĵo havu iom da informoj pri ili. Cetere, ĉi-febuare mi prelegos en la Historia Societo de Beaconsfield (kie la gekuzoj de Zamenhof havis somerdometon) por prezenti niajn malkovrojn pri S(Z)amenhofoj de Montrealo kaj Beaconsfield – mi jam prelegis pri la temo dum la montreala UK kaj eble pretos denove prelegi dum iu alia kongreso. Eble, ni aperigos ankaŭ iom da artikoloj pri la malkovroj. Krome, mi volas krei la vikipediajn artikolojn pri kelkaj parencoj de Zamenhof (ekz., la onklino) kaj aldoni mankantajn informojn pri aliaj parencoj (Jack kaj Louis S(Z)amenhof) – kie ekzistas entute nenio pri ilia enmigrado Ameriken kaj kion ili faris en nia mondoparto.

***AM: Danke al vi, s-ro Mann, la rakontisto, reprenis sian lokon en la Esperanto-historio. Kiu estis li?***

ĴA: Li estis unu el la pioniroj de la E-Movado, sekretario de la triopo, kiu ĉeforganizis la Kembriĝan Universalan Kongreson de 1907. Li ankaŭ estis redaktoro de La Brita Esperantisto, multege verkis kaj tradukis, aperigis librojn... Malgraŭ ĉio ĉi, bedaŭrinde, s-ro Mann eĉ ne aperas en la libro pri la pioniroj de la E-Movado en Britio. Li ĝis nun ne havis eĉ vikipedian artikolon. Interese, ke tiun nunan artikolon kreis ne mi, sed homo, kiu spektis la teatraĵon en Jutubo! (Mi mem eksciis, ke kreigis la artikolo, el la komentoj de la video). Mi, certe, planas ankaŭ plibonigi tiun artikolon kaj aldoni, kion ni eksciis pri s-ro Mann.

***AM: Kiom gravas muziko en via teatraĵo?***

ĴA: Muziko estas ege grava parto de la teatraĵo, kiu helpas prezenti la rakonton kaj la tempon. Unu el la kantoj estas la himno „Patro nia, ni alvenis”, kiun oni kantis kaj dum la Vaŝingtona UK en 1910, kaj dum la Montreala UK en 2022 ([mallonge.net/diservo2022](https://mallonge.net/diservo2022)), verkita de la fama Clarence Bicknell. Ankaŭ la aliaj muzikaĵoj estas ege specialaj -- temas pri

la unua kanto en Esperanto eldonita en Nord-Ameriko: „Mi aŭdas vin”, vortoj de Leono Zamenhof, muziko de Herbert Harris. Imagu, ke tiu kanto estis perdita por pli ol cent jaroj! Mi informiĝis pri ĝi dum mi faris miajn esplorojn pri/por la teatraĵo. Ĝi premieris vive dum la Vaŝingtona UK en 1910 (ĝia komponisto, Herbert Harris, ankaŭ prezentis ĝin). Mi aparte ĝojas, ke tiu grava parto de nia Esperanta kulturo – la unua E-kanto en Ameriko – revenas al ni, pere de la teatraĵo, post jarcento da forgeso! Ĉar pluraj personoj petis la notojn, mi disponigas ilin por ĉiuj, kiuj ŝatus ludi, kanti kaj prezenti ĝin!

### ***AM: Kiun vi volas danki plej multe pri via teatraĵo?***

ĴA: Mi ne povas fini la rakonton sen diri, kiom dankema mi estas al la aktora skipo: Garry Evans kaj Alena Adler (kiu ankaŭ estis la reĝisoro), la muzikistoj: Stefano (Étienne) Laflamme kaj Kristina Miroŝkina, la demanduloj (ili faris absolute brilan laboron, kun nur du ekzercoj!) – aparte Brandon Sowers, kaj, memkompreneble, al Alex Miller (*Exploring Esperanto*), kiu ne nur filmis kaj tiom bone muntis la tuton, sed ankaŭ multe konsilis, kiel profesia aktoro kaj dramaturgo. Dankegon al ĉiuj, kiuj helpis kaj konsilis! Estis vere mirinda sperto labori kun tiom da talentuloj! Mi esperas, ke la pedagogoj kaj lernantoj trovas en la teatraĵo same multe da ĝojo kaj ĝuo, kiom ni trovis farante ĝin!

### **Pliaj informoj:**

- La teatraĵo spekteblas en la Jutuba kanalo „Exploring Esperanto” ([youtube.com/@ExploringEsperanto](https://www.youtube.com/@ExploringEsperanto)); rekta ligilo: [mallonge.net/1910](https://mallonge.net/1910)
- Intervjuo pri la teatraĵo: revuo Esperanto, januaro 2023 - <https://uea.org/revuoj>
- Ĵenja Amis, Garry Evans and Alena Adler: triopa intervjuo en la Oka Epizodo de Usona Persono: <https://www.youtube.com/@usonepersone>
- La notoj de la kanto „Mi aŭdas vin”: <https://mallonge.net/miauxdasvin-notoj>

## **Kursoj en Senegalo**

*de Vjaĉeslav IVANOV (Rusio)*

En la lasta kvarono de la jaro 2022 mi havis honoron gvidi kurson de Esperanto en Senegalo kadre de preparado por la 8-a Afrika Kongreso en tiu okcident-afrika lando. La projekton de la kurso preparis kunlabore ILEI, la Afrika Komisiono de UEA kaj la loka asocio SEA (Senegala Esperanto-Asocio), kun Mireille Grosjean kiel motoro. Ĝi estis anoncita komence de la

jaro. Pli ol dudek kandidatoj plenigis enketilon. Inter ili post ekzamenado kaj Zoom-kunvenoj estis elektitaj mi por plejparto de la daŭro kaj Espoir Kasati el suda DR Kongo kiel la dua instruisto por la finaj tri semajnoj (tiam ni instruis en du lokoj samtempe).

La kurso daŭris de la 10-a de oktobro ĝis la 23-a de decembro. Lecionoj okazis ĉiun labortagon laŭvice (en decembro samtempe) en du najbaraj urboj – Rufisko kaj Dakaro. Unu leciono daŭris 140-180 minutojn, plej ofte en leciono partoprenis ĝis dek lernantoj, sed en apartaj tagoj estis pli ol tiu kvanto. Nur unu leciono ne okazis pro neveno de eĉ unu lernanto. En la retaj babilejoj de la du grupoj estas 29 kaj 18 homoj respektive – sen du instruistoj kaj du ĉeforganizantoj (25 kaj 14 do) estas homoj, kiuj almenaŭ unu fojon estis en la kurso kaj restas en la virtuala grupo ĝis nun konservante intereson pri daŭra lernado kaj uzado de Esperanto.



*Kurso en Rufisko*

### ***Jen miaj respondoj al la IPR-demandoj:***

*IPR: En kio la instruado tie malsamis, kompare kun via kutima instruado en via lando?*

Mi neniam havis bonŝancon instrui ĉiutage dum tiom da tempo. Plej ofte ĉeesta grupo apenaŭ povas kunveni dufoje semajne, kaj per la reto estas plej ofte individuaj lecionoj. Ankaŭ la ejoj estis multe pli bonaj ol mi kutime sukcesas trovi en Peterburgo: vastaj, bone prilumigitaj.

Senegalo havas kulturajn specialaĵojn, kiuj influis la instruadon. Multe helpis bona kaj atenta rilato al la instruisto. Iom malhelpis sinĝena modesteco de



kelkaj lernantoj, pro kio ili tro mallaŭte parolis. Mi devis instrui kaj insisti, ke dum lernado de fremda lingvo oni aŭdacu paroli pli laŭte, kun emfaza elparolo. Pri la elparolo, evidente, estis alia malsamaĵo kun mia kutima sperto: senegalanoj havas aliajn fonetikajn problemojn pri Esperanto, interalie por multaj malfacilas distingi inter di/ĝi, ti/ĉi kaj aliaj paroj.

*IPR: Kiun metodon vi uzis? Kie estis malfacilaĵoj?*

La kerno de la kurso estis la lernolibro de Zagreba metodo. Tamen por ĉiu leciono de la lernolibro ni faris ne malpli ol kvar aliajn lecionojn kun aldonaj ekzercoj. Ĉar mi mem estas ravita de Esperanta gramatiko, mi rakontis pri la strukturo kaj proponis de tempo al tempo gramatikajn kaj tradukajn ekzercojn. Tamen pli grandan emfazon mi faris al „problema instruado”, kiam lernantoj devis fari dialogojn laŭ proponita sceno (ekzemple „dungito parolas kun la ĉefo pri sia salajro”, „la ĉefo petas dungiton labori dimanĉe”, „la posedanto respondas demandojn pri luota loĝejo”) aŭ monologe proponi solvojn al problemoj (ekzemple „kion fari por solvi la trafikajn problemojn en Dakaro?”). Kelkfoje ni kantis kune kaj analizis tekston de kanto, mi uzis ankaŭ kelkajn ludojn (inter ili la ludon „Sep bienoj” de s-ro Wierzbowski pri Esperanta vortfarado, troveblan ĉe Edukado.net; en Rufisko mi uzis ĝian version kun ses bienoj). Ni multe parolis pri ŝatokupoj kaj familiaj temoj, por ke ĉiu lernanto havu pretan sinprezenton.

La ĉefa malfacilaĵo por mi kiel instruisto estis la bezono ofte ŝanĝi la planon de leciono pro apero de novaj lernantoj. Se hieraŭ venis tri bonaj kaj oftaj lernantoj kaj unu loka esperantisto-progresanto, mi planas daŭrigon de tiu leciono kun pli malsimplaj taskoj, sed morgaŭ el ili venas unu aŭ neniu, anstataŭe venas kelkaj novuloj kaj mi devas adaptiĝi. La lecionoj okazis ĉiutage, sed la lernantoj havas sian vivon kaj venas laŭ eblo, do ne ĉiutage, tio bonas por interkonigi ilin, sed malfaciligas la laboron de la instruisto, la kurso iĝas pli simila al klubkunvenoj por komencantoj.

La alia evidenta malfacilaĵo estis la lingva baro: malgraŭ tio, ke mi parolas iom pli ol bazan francan, mi ĝis la fino de mia restado ne tute bone komprenis la parolatan lingvon de Dakaro, speciale kiam la proporcio de la volofa lingvo en ĝi estis pli alta. Pri tio multe helpis la ĉeesto de la lokaj spertaj esperantistoj Assane Faye kaj Lafi Charles Diatta. Ili estis en preskaŭ ĉiu mia leciono por mallongaj klarigaj intervenoj, ĉiam tre utilaj. En la lasta monato de nia studado, je mia granda feliĉo, ankaŭ la pli aktivaj lernantoj povis helpi pri klarigo por la postrestantaj en la „urba volofa” lingvo, kiu estas fakte la ĉefa interreta lingvo en senegalaj urboj.

Inter malfacilaĵoj mi menciis ankaŭ ciferecan malegalecon, kiu ne permesis fari virtualajn parolsesiojn, kiujn mi provis enkonduki aldone al la lecionoj: ekster la ĉefurbo la retkonekto estas kaj malrapida kaj senteble kosta. Ankaŭ ne ĉiu lernanto havas taŭgajn kondiĉojn por reta studado: apartan kvietan ejon.

*IPR: Kia estis la reago de tiuj novaj esperantistoj? Kio estis plej facila por ili, plej malfacila?*

La kursanoj ŝatis la lingvon, eble danke al la bona ekzemplo de pli spertaj esperantistoj, kiuj varbis por la kurso. Ili rapide kaptis certajn trajtojn de Esperanta fonologio kaj ĝoje kreis „novajn vortojn” el la francaj kaj hispanaj, kiam mankis al ili scio pri la ĝusta vorto en la lingvo internacia. Mi ĝojis pri tiaj provoj kaj ĉiam bonvenigis ilin — mi kredas, ke gravas rapide ekparoli kaj ekuzi la lingvon por internacia kaj asocia komunikado, lerteco kaj granda vortostoko certe venos poste. La alia vojo estas ĉiam resti lernanto de la lingvo, neniam „sufiĉe preta” por verki kaj movadumi.

Inter la gramatikeroj de Esperanto antaŭvideble malfacila estis la akuzativo. Rezulte, eĉ en la fina ekzameno dum la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto, 18 el 21 ekzamenatoj skribis pri banano, kiu manĝos mian koleginon (parto de la gramatika testo, kie la nekutima vortordo estas kaptilo por homoj, kiuj kutimas meti akuzativon nur post verbo ene de frazo). Aliaj temoj estis tamen pli simplaj, ol ili kutime estas, ekzemple mi pli proksime al la komenco de la kurso enkondukis la sufikson -ig-, ĉar ĝi similas la gramatikon de *kaŭzativaj* verboj, kiujn la volofa lingvo havas. La volofaj ekzemploj vigligis la etoson kaj donis al la partoprenantoj ŝancon iom paroli pri sia propra lingvo, komparante gramatikojn de la du, Esperanto kaj la volofa.

Alilingvanoj ofte supozas, ke Esperanta vortostoko estas „facila promeno” por tiuj, kiuj jam parolas la francan. Fakte scio de la franca iom faciligas lernadon, sed ofte malhelpas: ekzemple, tiaj lernantoj ne povas enmemorigi germanevenajn radikojn (subite tre malsimilajn) aŭ misuzas aliajn pro misgvida simileco al la franca (voli anstataŭ flugi ktp.), ili ankaŭ rapide lernas esperantigi francajn vortojn, kio aperigas vortojn, kiuj fakte ne ekzistas en la lingvo.

### *Resume*

Por konkludo, la unua provo de intensa preparkurso por Afrika Kongreso estis sukcesa: granda parto de la lernantoj ekzameniĝis, partoprenis en la kongreso kaj volonte aktivis nun en renovigata landa asocio, aliaj konservis intereson kaj restas amikoj kun la pli aktivaj. Estas bone, ke en la daŭro de

la kurso estis rekonsiderita la dekomenca koncepto de kvar malgrandaj grupoj al la pli daŭripova koncepto de du pli grandaj: tiel ĉiu lernanto havis pli ofte la eblon partopreni en ĉeesta leciono. Estas senduba sukceso, ke la dua instruisto – Espoir Kasati de la Afrika Komisiono de UEA – venis ĉe la fino de la kurso kaj ekparolis en sia flua Esperanto pri la movado – lia ekzemplo, tiu de juna afrikano kaj decidfaranto ene de la strukturo de tutmonda esperantista organizo, certe impresis la lernantojn kaj pensigis ilin pri enmovadiĝo kaj daŭra uzo de la lingvo. Brila ŝanco por ajna lernanto estas havi tuj fine de la kurso gravan internacian renkontiĝon. En ĝi la novaj esperantistoj povis amikiĝi kun la gastoj el 14 plej diversaj landoj. Kvankam mi restas iom nekontenta pri la averaĝa nivelo atingita de la lernantoj, mi vidas, ke la plej oftaj vizitantoj de la lecionoj – Abdukarim, Ĥava, Mapenda, Nafisatu, Odilono kaj Roĥajatu – montris bonajn rezultojn, pri kiuj mi povas fieri.

La lecionoj estis malfermaj por progresantoj eklernintaj en alia tempo, ankaŭ ili bone progresis kaj multe helpis en studado: ekzemple, kiam mi atendis, ke lernantoj respondu demandon, mi ĉiam povis komenci de la pli pretaj por ke ili donu ekzemplon kaj rememorigu la bezonatajn vortojn.

Vi povas ekkoni kelkajn lernantojn per tiu ĉi 14-minuta filmeto de unu el niaj dimanĉaj renkontiĝoj, kiam dakaranoj venis gaste al Rufisko por kune lerni, ludi, tagmanĝi kaj eĉ danci: <http://amikeco.ru/el/novembro>.

Mi kore dankas UEA kaj ILEI, al Mireille Grosjean kaj ĉiu persono, kiu partoprenis en la preparlaboro, pro la projekto, kiu donis al mi la ŝancon pasigi tri monatojn en tia sencohava aktivado. En Senegalo mi sentis min vere feliĉa kaj utila.

## El la landoj kaj sekcioj

### Aŭstralio

Ni informas vin pri la bedaŭrinda forpaso de veterana nederlanddevena aŭstralia esperantisto Marcel Leereveld (1917-2023), kiu lernis E-on antaŭ 90 jaroj kaj havis la okazon renkonti persone ankaŭ Lidia Zamenhof. Li estis fervora Esperanto-instruisto, kiu jam en la kvindekaj jaroj atingis, ke Esperanto estu lerneja studobjekto agnoskata tutlande en Tasmanio. Marcel instruis ne nur en kursoj, per siaj libro kaj artikoloj, sed kontribuis ĝis



la lastaj jaroj de sia vivo ankaŭ al la semajna radioprogramo de la melburna stacio 3ZZZ. Pere de sia strikta opinio pri Esperanto-gramatiko li kreis tutan skolon kaj klerigis centojn da esperantistoj en Aŭstralio, el kiuj multaj ankoraŭ dum jardekoj memoros liajn instruojn kaj certe atentigos unu la aliajn pri liaj instruoj kaj klarigoj. Viajn memoraĵojn pri Marcel Leereveld vi povas postlasi ĉe lia prezento en la Panteono de edukado.net (<https://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=198>), kien li mem sendis sian biografion, kiam oni enpanteonigis lin okaze de lia 98a naskiĝdatreveno. Ripozu li en paco.

*Laŭ informoj de edukado.net*

## **Brazilo**

### **Raporto - ILEI/BRAZILA SEKCIO - 2022**

1. Partopreno en la 24-a Nordorienta Esperanto-Renkontiĝo kaj la 10-a Junulara Renkontiĝo de Nordoriento (24-a NER / 10-a JRN), kiel kunorganizanto kaj kunordiganto de la diskutrondo pri la temo: „Instruspertoj de Esperanto dum la pandemio” - la 26-an kaj 27-an de februaro 2022 (<https://youtu.be/aJxSyTVDC8E>);
2. Mi gvidis virtualan kurson de Esperanto - Niveletoj A1-A2, de la 02-a de aprilo ĝis la 27-a de aŭgusto 2022. Aliĝis 106, ĉeestis la unuan lecionon 58 kaj finis la kurson 22;
3. Partopreno en la 3-a VEKI - de la 23-a ĝis la 30-a de julio 2022 - Mi prelegis pri „Virtualaj Esperanto-kursoj per Google Classroom: spertoj de brazila instruisto” la 26-an de julio 2022 (<https://youtu.be/jslfOrPIXIM>);
4. Partopreno kiel kunorganizanto de la 2-a VERSo - Virtuala Esperanto-instruista Renkontiĝo de Sud-Ameriko - La 17-an de Septembro 2022 (<https://youtu.be/B4nNxOchON8>);
5. Mi gvidis virtualan kurson de Esperanto - nivelo B1 - de la 24-a de septembro ĝis la 17-a de decembro 2022 - aliĝis 24 kaj finis la kurson 14. La kurso havis la partoprenon de Tatjana G. LOSKUTOVA, instruistino el Rusio kiel observanto;
6. Partopreno, kiel observanto, en la Mezgrada Kurso de Tatjana G. LOSKUTOVA, instruistino el Rusio (La kurso daŭre okazas sabate de la 14-a ĝis la 17-a UTC per Zoom);
7. Mi trapasis la retan KER-ekzamenon je nivelo C1 Kompleksa - en junio 2022;
8. Preparo de 62 videetoj kaj alŝutado al la kanalo de la Brazila ILEI-sekcio;
9. Partopreno de 7 el niaj klasanoj en la „Tago de la Esperanta libro /Zamenhof-tago 2022” (<https://youtu.be/Qd2O-08ZrY>).

*Aristóphio Andrade ALVES FILHO*

## Belgio

### Kunlaboro inter la du Bruselaj Liberaj Universitatoj

La 15-an de februaro 2023 12 personoj

- el ULB (Brusela Libera Universitato, franclingva),
- el VUB (Brusela Libera Universitato, nederlandlingva) kaj
- el EBG (Esperantista Brusela Grupo)

kunvenis en VUB je invito de Kristin Tytgat (VUB). La gvidanto de la renkontiĝo estis Adam Brooking, iama VUB-studento kaj nuna instruisto de Esperanto en EBG. La duono de la grupo konsistis el junaj studentoj. Ili konatiĝis dum la lasta IJK en Nederlando. Inter ili plej aktivis Atiljo, juna inĝeniera studento de ULB. La komuna lingvo inter la ĉeestantoj estis E-o.



Dum la kunveno okazis la fondo de universitata Esperanto-grupo de la du universitatoj. Ĝia nomo estos KLUBO, akronimo de Klubo de la Libera Universitato de Bruselo. LUBO estas vorto por kaj ULB kaj VUB. Celoj:

1. Disvastigi la lingvon en ambaŭ universitatoj: organizi lingvokursojn, prelegojn, enkondukojn kaj babiltablojn.
2. Agadi ekster la universitato: organizi fulmkursojn en bazaj lernejoj kaj mezgradaj lernejoj.
3. Sentemigi homojn al lingvokulturaj problemoj kaj lingvaj rajtoj. Interesa temo en la multlingva urbo Bruselo kaj studobjekto en VUB.
4. Organizati kulturajn interŝanĝojn pere de E-o: eble en Erasmus+ projekto
5. Organizati studentajn kantvesperojn, renkontiĝojn pri folklorajoj, dialektoj ktp.

*Kristin TYTGAT*

## Ĉinio



Ĉina Kongreso de Esperanto, montrante ĝis la fino sian grandan amon por nia lingvo.

\*\*\*

La 14-a Ĉina Kongreso de E-o okazis la 25-an de marto 2023 en Pekino, kun partoprenantoj kaj delegacioj de la tuta lando, de Yunnan ĝis Harbino. Dum ĝi okazis ankaŭ Instruista Forumo sub la gvido de la sekciestro de ILEI, Wei Yubin (Jado). En la Junulara Forumo partoprenis interalie 15 gestudentoj de la kvar-jara E-fako de Zaozhuang-Universitato en Shandong-provinco. Ili sin prezentis kaj ricevis varman subtenon kaj konsilojn fare de la partoprenantoj.



## Kroatio

### Ciferecigo de gazetoj

En novembro 2022 Dokumenta Esperanto-Centro (DEC), la nacia Esperanto-arkivo en Kroatio, finis tre gravan projekton de ciferecigo de ĉirkaŭ 4200 paĝoj de la gazetoj „Konkordo” (1924-1928), „Balkana Konkordo” (1931) kaj „La Suda Stelo” (1932-1973). Laŭ la mendo de DEC la ciferecigan laboron plenumis la profesia firmao Point s.l.r. en Varaždín, kaj la projekton nome de DEC gvidis Josip Pleadin, kaj nome de Point s.l.r. Danko Tkalec. La projekto en junio 2022 ricevis subvencion de la kroata Ministerio pri Kulturo kaj Amaskomunikiloj kadre de la protektado de la „Tradicio de Esperanto” kiel Nemateria Kultura Heredaĵo de Kroatio n-ro Z-

7298, kiu estis proklamita en 2019. La projekton 50-procente kunfinancis ankaŭ la usona fondaĵo Esperantic Studies Foundation (ESF).

Pri la plenumita laboro sendis sian pozitivan pritakson al la Ministerio ankaŭ la Konservista Fako el Bjelovar, la respondeca regiona institucio pri konservado kaj protektado de kulturaj valoraĵoj. La gazetoj estas ciferecigitaj en la formatoj PDF kaj OCR, kaj la rezultoj de la projekto nun estas konsulteblaj ĉe: <https://library.foi.hr/zbirka/dechr>.

*Josip PLEADIN*

## **Rumanio**

### **Esperanto en Rumanio**

Inter 28 kaj 30.10.2022 en la urbo Gherla okazis la Kongreso de Esperanto-Asocio de Rumanio (EAR) ĉe la Kultura Fondaĵo TEKA. La lokaj organizantoj estis niaj agemaj gekolegoj Mariana Berariu kaj Adrian Mărginean kunlabore kun la estraro de EAR. Partoprenis 35 esperantistoj enlandaj kaj 3 el Hungario.

Inter la programeroj de la Nacia Renkontiĝo de Esperantistoj estis kelkaj pli gravaj: Ekspozicio de esperantaĵoj; Interkona vespero, la kvara epizodo (la rumana) de la ILEI-projekto *Granda homa ĉeno*; elekto de la nova Estraro de EAR; prezentado pri la partopreno en la 107-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo (Aurora Bute), kunveno kun la ILEI-membroj (Mihai Trifoi), libroprezento (*Rumana-Esperanto vortaro*, de Mariana Pitar kaj Florica Popa), Internacia Tago de Paco (Doina Popa), Esperanto-kurseto kaj prezentado de didaktikaj materialoj (Mihai Trifoi), sukcesa art-kultura mozaiko (Aurora Bute, Mariana Berariu, Emil Crâncău, Petronela Birta, Adrian Mărginean, Ionela-Adriana Dolca, Mihaela Dolca);

Dum la lasta tago de la Kongreso okazis: *Simpozio de Esperanto*, kadre de kiu prezentis prelegojn: Mihai Trifoi, Mariana Berariu, Mariana Pitar, Adriana Dolca kaj Mihaela Dolca.

La rezultoj de la elekto de la nova Estraro de EAR: Mariana Pitar – prezidanto, Aurora Bute – internaciaj rilatoj, Mihai TRIFOI – instruado, rilatoj kun ILEI, Petronela Birta – financoj, Cătălin Văduva – komunikado. La valora esperantisto Emil Crâncău estis elektita honora-membro de EAR. Pri tiuj eventoj aperis artikoloj en tri rumanaj ĵurnaloj. La nova Estraro de EAR decidis „novigi” la E-movadon en Rumanio. Post la elekto estiĝis retaj E-kursoj en la urbo Timișoara (gvidas Mariana PITAR) kaj en la urbo Suceava (gvidas Ionel Bodale). Honoriga por ni estas la fakto, ke dum la 107-a UK nia koleginino Aurora BUTE estis elektita kiel estrarano de UEA.

La 13-an de januaro 2023, okaze de la omaĝa festo por la plej elstara nacia poeto, Mihai TRIFOI prezentis en rondo de intelektuloj la prelegon „Mihai Eminescu en Esperanto”.

*Mihai TRIFOI, sekciestro*

## **Nederlando**

En januaro 2023 forpasis en Nederlando Sophia Mensen. Ŝi estis Cseh-instruistino, gvidanto de kursoj en Nederlando, Francio kaj Germanio. Antaŭe ŝi aktive agadis en ILEI. Ŝi en la sepdekaj jaroj instruis Esperanton ankaŭ en la Montessori lernejo, kies direktorino ŝi estis.

Meze de la 70-aj jaroj s-ino Mensen kontribuis kun siaj 21 lernantoj el Soest al la fama dujara lerneja eksperimento, organizata de Szerdahelyi, cele al la scienca pruvo de la propedeŭtika valoro de Esperanto. Partoprenis en ĝi dek unu lernejoj: St. Gerard (Belgio), Hannebont kaj Le Mans (Francio), Soest, Waalwyk kaj Wormer (Nederlando), Ateno (Greklando nur dum unu jaro), Peine, Balge kaj Dollbergen (Germanio) kun entute 327 lernantoj. Pri la tuta eksperimento legu ĉe la raporto de Helmuth Sonnabend titolita *Esperanto: lerneja eksperimento*.

Multajn el la instruhelpiloj, kreitaj de Sofino, ŝi jam antaŭ pluraj jaroj donacis al la redaktoro de edukado.net, kaj nun ĉiuj ŝiaj Esperanto-libroj estas transprenitaj. Ili riĉigas la kolekton de nia retejo kaj ties redaktoro, parte servos ankaŭ kiel librodonaĵoj por diversaj agadoj.

Sofino Mensen jam de 2010 estas en la Panteono de edukado.net (<https://edukado.net/biblioteko/panteono?iid=62>), kie vi povas postlasi memordensojn.



*Laŭ informoj de edukado.net*

## **Serbio**

### **Tri retkursoj**

En Serbio ekde la unua semajno de novembro 2022 okazas tri kursoj, kiuj daŭros ĝis majo 2023:

- A1 por komencantoj
- A2 por komencintoj, kiuj jam iom lernis per Duolingo aŭ alimaniere
- B por progresantoj – unuavice planita por la finintoj de la pasintjara A-kurso de SEL (Serbia Esperanto-Ligo) kaj de la A-kurso por blinduloj, kiun gvidis Nedeljka Ložajić. Aperis ankaŭ aliaj interesatoj.



La kursoj okazas per Zoom kun entute 17 partoprenantoj de ĉiuj 3. Multaj el ili frekventas paralele A1 kaj A2, aliaj A2 kaj B, kelkaj eĉ ĉiujn 3, kaj ĉiuj profitas el tio. Precipe fervoraj estas la kursanoj el la antaŭa kurso de Nedeljka Ložajić, kiuj trapasis kursfinan ekzamenon komence de novembro 2022 (vidu la tekston de Aranka Laslo). Nun, krom la kursoj, ili regule ĉeestas ĉiumonatajn kunvenojn de SEL kaj sesiojn de VERO (Virtuala Esperanto-Renkontiĝo kun prelegoj kaj diskutoj pri diversaj movadaj kaj ekstermovadaj temoj), kiun Nedeljka gvidas ĉiumonate kun partoprenantoj el pluraj landoj. Tiel la kursanoj renkontas Esperanton en praktika uzo kaj akumulas siajn lingvokonajn.

La startmotoro de la kursoj estis Jovan Zarković, la prezidanto de SEL. La administra plumotoro estas LASLO Aranka, komitatano de ILEI kaj sekciestro de ILEI-RS.

La kurson A1, du fojojn semajne po unu horo, gvidas alterne Jovan Zarković kaj Aranka Laslo. Jovan instruas laŭ kursmaterialoj, kiujn li kaj Zlatoje Martinov kreis antaŭ multaj jaroj por ĉeestaj kursoj kaj nun adaptis por la reta uzo. Aranka uzas la rektmetodan lernolibron de Stano Marček, lecionojn de Anna Löwenstein en formo de video-prezentaĵoj kaj aliajn materialojn troveblajn en la reto.

Radojica Petrović gvidas la kurson A2 asistate de Aranka Laslo, du fojojn semajne po unu horo, laŭ kursmaterialoj, kiujn li mem kreas, aŭ ĉerpas el Esperanta literaturo, por ĉiu leciono konforme al antaŭaj (tre diversnivelaĵ kaj diversfonaĵ) scioj kaj aktualaj atingoj de la kursanoj.

La kurson B, unu horon unufoje semajne, alterne gvidas Živanko Novakov (laŭ „Paŝoj al plena posedo”) kaj Zlatoje Martinov (pri E-movado kaj – kulturo, laŭ propraj instrumaterialoj).

La instruhoroj estas registrataj kaj poste reuzeblaj por tiuj, kiuj ne povis partopreni, aŭ deziras refoje aŭdi la lecionon.

*Radojica PETROVIĆ*

## **Ukrainio**

**„Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante ni iru la vojon celitan...”**

*Ludoviko Zamenhof*

La 3-an de decembro de la jaro 2022 pere de Zumo okazis la kunveno de la sekcio de ILEI en Ukrainio, en kiu partoprenis eksterlandaj kolegoj. La kunveno respegulas la staton de E-instruado kaj -informado, pro tio mi volas pli detale rakonti pri ĝi. Do, entute estis 14 partoprenantoj, kiuj sukcesis aliĝi. La problemoj estas, ke dum la milita tempo en diversaj regionoj de mia lando

ofte forestas elektro, reto kaj akvo. Pro tio estas malfacile organizi iun ajn aranĝon. Danke al la helpo de Marija Belošević el Kroatio ni sukcesis.

La kunveno startis per la prelego de *Mireille Grosjean* (Svislando), eks-Prezidantino de ILEI (2013–2021). Ŝi rakontis pri multjara sperto de E-instruado en diversaj landoj de Eŭropo, Azio, Ameriko kaj Afriko, pri specifaj trajtoj de la okcidenta kaj orienta lingvometodikoj. Estis interese pli profunde ekscii pri ŝia „koridora” laboro ĉe UNO kaj UNESKO por konvinki homnojn tie, ke E bone servas kiel interkultura helpkomunikilo. Samtempe la prelegon sekvis membroj de Liona E-klubo en Francio, kiuj invitis Mirejon prelegi dum ilia kunveno kaj disponigis aldonan duonhoron, la komputilon kaj la salonon.

Poste sekvis la prelego de *Grażyna Szubryczyńska* (Pollando), instruistino en la Toruna bazlernejo nr 35, kiu rakontis pri sia instruado en la infanĝardeno kun bonegaj fotoĵoj kaj videomaterialoj. Grażynka sukcesas uzi E-n en la interkultura laboro kun la infanoj, komunikigante ilin kun samaĝaj lernantoj el kelkaj landoj en Eŭropo kaj Azio.

Dum libera programo elpaŝis *Alessandra Madella* (Italio), d-ino pri komunikaj studoj, nuna estaranino de ILEI, kiu rakontis pri planoj de ILEI, pri la projektoj de la itala sekcio, pri la 56-a ILEI-kongreso 2023 en Lignano Sabbiadoro apud la urbo Venecio. Ni pli detale eksciis pri la itala projekto „30 oraj horoj: Instruado en lernejoj, la 30 horoj kaj adaptado aliloke” fare de *Bruĉjo Kasini*, *Laura Brazzabeni* kaj *Alessandra Madella*. Krome, estas tre grava okupiĝo de Alessandra la katalogado kaj disponebligado de diplomlaboraĵoj kaj disertacioj, verkitaj en la italaj universitatoj rilate al E. Estis plezuro paroli kun *Luigia Oberrauch Madella*, profesia instruistino de la germana lingvo, la estrino de la ILEI-sekcio en Italio. Ŝi kun la forpasinta edzo Vittorio kaj aliaj esp-istoj organizis bonegan ILEI-konferencon en la urbo Parmo en la jaro 2006.

Poste aperis *Renato Corsetti* (Britio / Italio), eks-prezidanto de UEA (2001–2007), emerita profesoro pri psikolingvistiko de la Roma universitato „La Sapienza”, poligloto, kiu interesiĝas pri dulingvismo kaj denaskismo de esp-istoj kaj instruis E-n en diversaj landoj de la mondo. Nun Renato multe faras kiel helpanto de ILEI por restarigi landajn sekciojn, gvidas diversnivelajn kursojn, okupiĝas pri kunlaboro de la universitatoj kaj komunaj sciencaj projektoj, pri retprelegoj en Londona E-klubo, pri tradukado k.t.p. Bedaŭrinde li aliĝis al la retkunveno nur por apenaŭ duonhoro, ĉar li rapidis al la E-kurso por orientanoj.

*Marija Belošević* (Kroatio), ĵurnalistino, eksa estraranino kaj sekretario de ILEI, estrino de la Kroata ILEI-sekcio KEU, membro de IKUE, multjara gvidantino de E-kursoj, parolis pri diversflankaj atingoj de la kroataj E-instruistoj kaj pri la graveco de E-tradukoj de etn-lingvaj verkoj.

*Aida Čizikaitė* (Litovio), eksa estraranino de ILEI, profesorino en la Kaunasa universitato, kiu organizis bonegan ILEI-konferencon en la urbo Kaunas (2005), rakontis pri la direktoj de la scienca kunlaboro de la universitatoj, pri internaciaj konferencoj, kie estu videblaj kontribuoj de esp-istoj, pri instruado de E en ŝia lando.

Ukrainaj esp-istoj rakontis pri la atingoj de E-instruado en Ukrainio. *Svitlana Pohorila* (urbo Kijivo), profesia instruistino pri la angla lingvo kaj E, parolis pri sia instruado al la ukrainiaj kaj eksterlandaj esp-istoj. Nun ŝi havas retajn E-kursojn por polaj esp-istoj. *Semen Vajnblat* (urbo Odeso), ĵurnalistoj kaj tradukisto, veterano de la E-movado, estarano de UkrEa kaj multjara gvidanto de la E-klubo „Blanka akacio”, informis pri E-kurso por la komencantoj en la urba biblioteko (kun helpo de la Prezidanto de UkrEA, profesia instruisto pri la angla kaj la ukraina lingvoj *Ihor Glaholevskij*). Krome, estis menciita *Eŭgeno Kovtonjuk*, la unua prezidanto de UkrEA, la prezidanto de la bonfara fonduso „Espero”, kiu okupiĝas pri eldono de la originalaj kaj tradukitaj verkoj de la ukraindevena blinda esp-isto Vasil Eroŝenko. Eŭgeno tiutempe oficvojaĝis eksterlanden kaj partoprenis en la kunveno nur en la komenco. *Niko Voloŝin* (urbo Lucjk), ĵurnalistoj, eldonistoj kaj pentristoj, kiu dum la milito devis rifuĝi al Pollando kaj poste al Hispanio por savi siajn infanojn, rakontis pri diversaj artprojektoj, en kiuj li partoprenas kaj helpas propagandi E-n.

*Nina Danylyuk*, estro de ILEI-sekcio en Ukrainio, profesoro pri la ukraina lingvo en Lesja Ukrainka Volinia nacia universitato, prezentis la raporton pri la laboro de la sekcio en la jaroj 2021-2022. Ŝi diris, ke la ukraina sekcio de ILEI konsistis el 12 membroj: 5 membroj de ILEI kaj 7 ”internaj membroj”. Pro la malfacila situacio en la lando okazis nur du E-kursoj: por la polaj komencantoj (rete – la instruistino *Svitlana Pohorila*) kaj por la ukrainaj komencantoj (ĉeeste – la instruisto *Semen Vajnblat*). E estis prezentita dum la studkursoj „Enkonduko al la ĝenerala lingvistiko” kaj „Sociolingvistiko” en Lesja Ukrainka Volinia nacia universitato (gvidis *Nina Danylyuk*). En la sama universitato, kie ekde la jaro 2015 funkcias E-centro, okazis prelegoj kaj ekskursoj por studentoj kaj lernantoj. Estis prezentita la instru-metodika lernolibro „Lesja Ukrainka en la mondo de la tradukoj”, kiu enhavas la tradukojn en 12 eŭropajn kaj orientajn lingvojn, inter ili E

(ĉefredaktoro kaj gvidanto de la projekto estas mi). Nina prelegis pri E-tradukoj de la verkoj de Lesja Ukrainka dum la Internacia Simpozio (2021), Memorialo de Lucija Borčić (2021) kaj la kunveno de Londona E-klubo (2021). Estas preparataj materialoj por nova eldono de la poezio de Lesja Ukrainka en E (Nina Danylyuk, Semen Vajnblat, Viktor Pajuk, Petro Palivoda, Niko Vološin). Dum la virtuala UkrEA-kongreso estis organizita la kunveno de la ILEI-sekcio, prezentitaj la prelegoj pri KER-ekzamenoj (Katalin Kovács), AMO-seminarioj kaj EKO (Stefan MacGill) kaj instruado por emeritoj (Svitlana Pohorila) (2021). La studentinoj de Lesja Ukrainka Volinia nacia universitato partoprenis en la retinario „Esperanto kaj turismo”, kie oni prezentis Ukrainion kaj la Volinian regionon (2022). Nina Danylyuk elpaŝis kun la E-prelego *Ahatanhel Krimskij: sciencisto, poligloto, tradukisto* (2022). La intervjuo pri instruado de Esperanto, *Ukrainio esperas...* aperis en la revuoj *Juna amiko* (2022, nr 2) kaj *Esperanto aktuell* (2022, nr 3). Membroj de la ukrainia sekcio de ILEI partoprenis la 54-an kaj la 55-an virtualajn ILEI-kongresojn, du UEA-kongresojn, kelkajn AMO-seminariojn (2021, 2022).

La son- kaj video-registraĵojn de la kunveno faris Marija Beloŝević. Dankegon al ĉiuj ukrainiaj kaj eksterlandaj partoprenantoj! Grandan dankon al tiuj, kiuj subtenas ukrainajn esp-istojn per gastigado, monhelpo, leteroj, telefonado k.t.p. Ni nun estas pli fortaj kune kun vi!

*La estro de la sekcio, Nina DANYLYUK*

## Alice Vanderbilt Morris kaj IALA

*de Alessandra MADELLA (Italio)*


Julia Falk, en sia libro *Virinoj, lingvo kaj lingvistiko (Women, Language and Linguistics*, New York: Routledge. 2002) argumentas, ke oni kutime rakontas la historion de usona lingvistiko kiel ĉefe viran. Tamen, en la unua duono de la dudeka jarcento kelkaj virinoj grave kontribuis al nia nuntempa kompreno de tio kio estas lingvo. Ili valorigis komunikadon, substrekante la rilatojn inter lingvistiko kaj realaj lingvaj spertoj, inkluzive de la graveco de diverseco. Inter tiuj gravaj virinoj estis Alice Vanderbilt Shepard Morris (1874-1950, *vd surfote*), kiu en 1924 fondis Internacian Helplivan Asocion (International



Auxiliary Language Association aŭ IALA) kaj estis inter la fondintoj de Usona Lingvistika Societo (Linguistic Society of America aŭ LSA). Danke al ŝi, kelkaj lingvistoj interesiĝis pri monda lingvo.

Alice apartenis al prestiĝa usona familio. Ŝia praavo, la komodoro Cornelius Vanderbilt, jam posedis unu dolaron el ĉiuj ekzistantaj dudek usonaj dolaroj kaj post li la familia riĉo eĉ plu kreskis. La generacio de la gepatroj de Alice komencis konstrui luksegajn palacojn kaj organizi pompajn festojn. Sed Alice mem volis lerni kaj sekvis universitatajn kursojn. Dum la tuta vivo ŝi estis fama pro sia beleco. Kiam la verkisto Oscar Wilde vizitis Usonon en 1882, li parolis pri tri kialoj por ĝin viziti: Yosemite, Niagara Akvofalaro kaj Alice Vanderbilt. John Singer Sargent, ĉarmita de ŝia posedo de la franca, pentris ole-portreton de la dektrijara Alice, kiu nuntempe troviĝas en Amon Carter Muzeo de Usona Arto en Fort Worth, Texas. En 1895 ŝi edziniĝis kun riĉa ĉeval-bredisto Dave Morris (1872-1944) kontraŭ la volo de siaj gepatroj. Ŝi havis ses gefilojn kaj sin dediĉis al bonfaraj agoj.

Ŝi eklernis Esperanton verŝajne antaŭ la unua mondmilito kaj tio tute ŝanĝis ŝian vivon. Ŝia edzo varme subtenis ŝian novan pasion, ĉar ŝi povis facile lerni la lingvon kaj verki en ĝi kuŝante. Tion ŝi devis fari dum longaj horoj ĉiutage, ĉar ŝi daŭre havis dorsproblemojn ekde infana arbofalo. Kun la edzo, ŝi starigis kaj finance subtenis programon por kreskigi la intereson pri internacia helplingvo en Usono kaj eksterlande. Ŝi kunvenigis mond-famajn lingvistojn kaj antaŭenigis la serĉon pri lingvaj universalajoj, kiu ludas ankoraŭ gravan rolon en usona lingvistiko. Kunlaboris pri la fondo Frederick Gardner Cottrell (1877-1948), kiu lernis Esperanton kaj celis solvi per helplingvo la lingvan babelon de internaciaj ĥemiaj studoj, precipe post la ĉeso de la germana kiel tutmonda scienca lingvo pro la unua mondmilito. Li uzis la profitojn el sia patento pri elektrostatika precipitanto kontraŭ industria aer-poluado por tio. En Marto 1923 ekis en Novjorko serio da renkontiĝoj por promocii internacian helplingvon. En la unua partoprenis la fama filozofo kaj pedagogo John Dewey (1859-1952, *vd dekstre*) kune kun gvidantinoj de virinaj ligoj kaj geprezidantoj de novjorkaj kolegioj. Formiĝis du komitatoj, kiuj reprezentis respektive la akademian mondon kaj la komunikilan mondon, inkluzive de la ĵurnalo *New York Time*, Usonaj Telefono kaj Telegrafo (AT&T) kaj la Radia Korporacio de Usono (RCA). El ili naskiĝis IALA la jaron poste. Vanderbilt Morris estis la ĉefa motoro de la asocio.



Ĝuste tiam lingvistoj celis havi sian fakon rekonatan kiel sciencan, kiu studis homan lingvon malsame de literaturo, filologio kaj filozofio. Ili fondis la Lingvistikan Socion de Usono kaj ne volonte engaĝiĝis en praktika popularigado, kiuj riskus endanĝerigi tiun „sciencan” statuson. IALA parte klopodis solvi tiun problemon pere de sia „sciencia aliro”, kiu ne aparte subtenis jam ekzistantan helplingvon, sed celis elekti la plej taŭgan inter ĉiuj el ili nur post vasta komparado. Sed restis plia problemo: multaj lingvistoj profesie instruis fremdajn lingvojn kaj timis perdi sian vivrimedon en jaroj de ekonomia depresio per subteno al internacia helplingvo. Pro tiu malcerta pozicio ili tute ne povis havi simpatian por la pedagogiaj esploradoj de IALA, kiuj montris Esperanton kaj Ido kiel facile lerneblajn kaj propedeŭtikajn al la lernado de naturaj lingvoj.

Inter la mezo de la dudekaj jaroj ĝis la komenco de la tridekaj jaroj de la lasta jarcento, IALA helpis psikologon Edward L. Thorndike (1874-1949, *vd dekstre*) esplori, ĉu studentoj kaj lernantoj povas lerni helplingvon pli rapide ol naturajn lingvojn kiel la francan. Asistis lin ĉe la Instrua Kolegio de Universitato Columbia Laura H.V. Kennon kaj Helen S. Eaton, kiu estis plentempa esploristino de IALA. Ilia raporto de 1931 donis la rezultojn de serioza ses-jara esplorado: kvardek horoj da instruado kaj praktiko ebligis kompreni kaj uzi Esperanton je nivelo, kiu en lingvo kiel la franca aŭ la germana estas atingebla nur pere de du cent horoj da instruado kaj praktiko. Tiu modela pedagogia esplorado pri lingvo-lernado ne havis impreson sur la kreskanta komunumo de sciencaj lingvistoj en LSA, venante de alia fako. Sed dum kelkaj jaroj ĝi ebligis la instruadon de Esperanto kaj Ido fare de Helen Eaton en privataj lernejoj kaj universitatoj de la novjorka regiono. Ŝi eksperimentis ankaŭ pri „ĝenerala lingvo-kurso” por kreskigi konscion pri la organizado de lingvoj kaj tiel helpi la sekvan lernadon de fremda lingvo kaj pli bonan komprenon de la gepatra lingvo.



Kun IALA kunlaboris dum iu tempo kelkaj famaj lingvistoj, kiel la usona Edward Sapir (1884-1939, *vd maldekstre*), la dana Otto Jespersen (1860-1943), kiu kreis „Novial”, la angla Charles Kay Ogden (1889-1957), kiu kreis „Bazan Anglan” (Basic English), kaj la franca André Martinet (1908-1999). La modelo de internacia helplingvo laŭ Sapir devus alproksimiĝi al la simpleco de la ĉina, kiu ne bezonas kazojn, modojn, tempojn kaj komplikajn deriv-

sistemon. Li opiniis, ke evoluo igas lingvojn pli kaj pli analizaj, kiel la ĉina jam estas je alta grado, ĉar ĝi uzas malmulte da infleksioj. Vanderbilt Morris, kiu unue kontaktis Sapir kiam li estis prizorganta antropologian muzeon en Ontario, subtenis tiun vidpunkton, kiu ankaŭ gravis por Giuseppe Peano (1958-1932) en lia kreado de „Latino sine flexione”. Tamen Vanderbilt Morris estis pli proksima al Zamenhof en sia penso, ke vortoj de internacia helplingvo ne devas esti tute skeme fiksitaj fare de la kreintoj, sed devas kreski laŭ la praktika uzo de la parolantoj. Post la dua mondmilito Alexander Gode (1906-1970), kiu studis germanan literaturon kaj ne specife lingvistikon, finkreis „Interlingua” de IALA sen kazoj, genroj aŭ akordigo de adjektivoj kun substantivoj. Tiam lingvistiko jam iĝis tute aparta profesia fako kaj lingvistoj ne plu emis kunlabori kun IALA, kiu restis ankaŭ tro loke bazita en Novjorko. La asocio malaperis en 1953, tri jarojn post la forpaso de Alice Vanderbilt Morris, kiu per sia engaĝiĝo kaj homaj rilatoj helpis ĝin konstrui pontojn inter scienco kaj praktiko.

**Noto:** Parto de la artikolo aperis en Ĉina Radio Internacia:

<https://esperanto.cri.cn/recommended2/3842/20220525/759065.html>.

## **Instruu Esperanton al Via Infano, per Mil Unuaj Vortoj**

*de Penelope VOS (Aŭstralio)*

Probable vi konas *Mil Unuaj Vortoj en Esperanto*, verkitan de Heather Avery, ilustritan de Stephen Cartwright kaj eldonitan unue de Osborne, kaj poste de Esperanto-Asocio de Britio. La ilustraĵoj estas ĉarmaj kaj utilaj por instrui bazan vortprovizon taŭgan por infanoj. La libro prezentas nombrojn, adjektivojn kaj verbojn, kaj plejparte substantivojn, kaj povas esti stimulo por komenci konversaciojn en Esperanto, se la plenkreskulo jam scipovas Esperanton kaj havas lertecon pri instruado.

Se ne estas tiel, nova rimedo *Teach Your Child Esperanto, with Mil Unuaj Vortoj* povas transponti la breĉon, por ke ĉiu anglalingva plenkreskulo kaj infano povu uzi *Mil Unuaj Vortoj (MUV)* por kune lerni utilan nivelon de Esperanto.

La libro komenciĝas per klarigo kio estas Esperanto kaj kial ĝi estas bonega unua fremda lingvo, por ke infano kaj plenkreska familiano lernu kune.

La dua paĝo klarigas Esperantan prononcadon, kaj la tria temas pri prezentado al infano de la agado en maniero, kiu estigas varman rilaton inter la partoprenantoj kaj paroligos ilin ĝenerale, eĉ kiam la libroj ne estas en uzo.

Post ĉi tiuj enkondukaj aferoj, ĉiu paĝo prezentas serion de novaj gramatikaj elementoj aŭ esprimoj por uzi kun MUV kaj kreskigi konversacian kapablon. Komence ni simple aldonos „jen” al iu ajn substantivo: „Jen sapo”, „Jen bano”, „Jen bantuko”. Aldonu la vorton „Diru”: Diru „sapo” kaj „Jes” „jes, sapo”. Per tiaj etaj paŝoj kaj ripetado de la funkciaj vortoj la libro fariĝas kaj ludo kaj efika lernilo. „Lecionoj” akumulas por ke ĉiu paŝo estu regebla kaj neniu lernado estu forlasita sufiĉe longe por esti forgesita. (La BEK-kurso de Dennis Keefe uzas similan metodon por instrui al plenkreskuloj, kiun iuj legantoj eble spertis.)

Sur la venontaj paĝoj la plenkreskulo kaj infano lernos kiel uzi kaj respondi ĉiujn demandovortojn el la korelativa tabelo kaj uzi prepoziciojn de loko kaj preskaŭ ĉiujn afiksojn de Esperanto.

La paĝtitoloj estas: 1. Komencu paroli 2. Unuaj demandoj 3. Kie estas....? 4. Koloroj 5. Aliaj adjektivoj 6. Nombroj kaj kvantoj 7: Kie, ekzakte? 8: Korpo kaj vestoj 9: Vetero 10: Priskribado de homoj 11: Kiu? 12: Agoj 13: Pri la tempo 14: Horloĝoj, trompoj kaj posedo 15: Kiel? 16 Kien ili iras? 17: Havi, ŝati, voli.... 18: Kion fari? 19: Ŝaradoj kaj kialoj 20: Fini

*Mil Unuaj Vortoj* de Usborne estas disponebla en 13 lingvoj kaj proponas similan vortprovizon al lernantoj de iu ajn el tiuj lingvoj. Tamen tiuj aliaj lingvoj bezonus multe pli ol 25 (plene ilustritajn) paĝojn da strukturita konversacio por ebligi al komencantoj akiri la komunikan kompetentecon eblan per Esperanto. Ĉi tiu rimedo tiele sekvas fieran tradicion de etaj rimedoj, kiuj montras kiom bele strukturita estas nia bela lingvo.

Ĉi tiu libreto pritraktas du el la unuaj demandoj, kiuj malkuraĝigas lingvolernantojn: Kiu uzos ĉi tiun lingvon kun mi? Ĉu mi estos embarasata paroli kiel komencanto? Nu, ne, ĉar via infano (aŭ nepo aŭ nevino...) estos senkritike feliĉa havi vian plenan atenton, kaj la kurso ebligas progreson laŭ individua prefero de rapideco.

Aliflanke, ĝi certe povus esti uzata por grupetoj aŭ klasoj de infanetoj.

„Instruu Esperanton al Via Infano” haveblas malmultkoste kiel elektronika libro aŭ laŭpete presita libro de Amazon, kaj disvastiĝos per aliaj platformoj dum 2023.



# Eventa Servo

## por ILEI-sekcioj kaj ILEI-reprezentantoj

*de Didier JANOT (Francio)*

### **Kio estas Eventa Servo?**

Eventa Servo ebligas anonci eventojn lokajn, internaciajn, retajn... Eblas ankaŭ aperigi informojn pri Esperanto-organizoj. Ĉiuj Esperanto-organizoj inkluzive ILEI-sekciojn kaj eĉ ILEI-grupojn por landoj, kie ankoraŭ ne estas sekcio, povas krei sian retpaĝon ĉe Eventa Servo. Vizitu la retpaĝaron [eventaservo.org](http://eventaservo.org).

### **Kiel krei retpaĝon ĉe Eventa Servo pri sia sekcio aŭ grupo?**

Unue necesas krei individuan konton je sia nomo (klaku la butonon Ensaluti/Registriĝi supre dekstre). Poste iru al la paĝo „Organizo” kaj kondiĉe, ke oni ensalutis, troviĝas butono „Krei organizon”. Klaku kaj elektu nomon! La plej taŭga nomo estas ILEI-Landonomo prefere laŭ skribmaniero de Eventa Servo (ekz. ILEI-Francio) kaj por la nomo kaj por la mallonga nomo. Elektu vian landon en la listo kaj skribu ion en la kadro priskribo. La aliaj kadroj ne estas devigaj. Klaku la butonon „Registri”! Nun via organizo havas retpaĝon kun retligilo. Ne atendu por krei la retpaĝon de via sekcio aŭ grupo: tuj faru ĝin! Post kreado de la retpaĝo eblas ŝanĝi kaj plibonigi la tekston kaj aldoni aliajn informojn klakante la butonon „redakti”. Eblas ankaŭ aldoni aliajn administrantojn kaj krei eventojn nome de la organizo.

### **Kion meti en la kadron priskribo?**

Vi kreis la retpaĝon de via sekcio: gratulon! Nun necesas plibonigi kaj regule ĝisdatigi ĝin. Bona solvo estas, ke tie troviĝu:

- unua parto en Esperanto por informi esperantistojn el la lando pri la sekcio, ĝia agado, inviti al membriĝo kaj informi kiel membriĝi,
- dua parto en nacia lingvo por informi neesperantistajn instruistojn, kiuj interesiĝas pri la afero.

Do la du partoj ne estu originalo kun traduko, sed du malsamaj tekstoj por du malsamaj publikoj.

Gravas ke troviĝu informo por kontakti iu(j)n, ekzemple la sekciestron, reprezentanton aŭ alian respondeculon. La ligilon de via retpaĝo vi diskonigu en via landa E-movado kaj al neesperantistaj instruistoj kaj interesiĝantoj.

Jen ekzemplo pri ILEI-Francio: [eventaservo.org/o/ILEI-Francio](https://eventaservo.org/o/ILEI-Francio)

## Kiu faru?

Pli bone zorgu pri tio la sekciestro aŭ la reprezentanto, sed povas ankaŭ esti alia estrarano de la sekcio, aŭ kunlaboro inter pluraj homoj. Por helpo aŭ konsiloj kontaktu [didier.janot@gmail.com](mailto:didier.janot@gmail.com).

## Novaĵoj

### **INSTRUISTA TREJNADO en kunlaboro de la Interlingvistikaj Studoj de UAM, Edukado.net kaj ILEI**

La Interlingvistikaj Studoj de la Universitato Adam Mickiewicz (Poznano, Pollando) Edukado.net kaj ILEI denove kune organizas unujaran instruistan trejnadon, kiu disponigas la necesajn konojn kaj lertojn por instruado de Esperanto kaj trejnos la partoprenantojn pri metodiko.

La kursaro necesigas partoprenon unufoje en la surloka intensa semajna sesio en Pollando (09-15.09.2023).

La sekvaj sesioj okazos rete: du semajnfinaĵoj renkontiĝoj en 2023, 4-taga sesio en februaro 2024 kun aldona ekzameno, kaj denove du semajnfinaĵoj printempe de 2024. Inter la retaj sesioj la partoprenantoj laboros hejme pri la ricevitaj taskoj, uzante ankaŭ la retejon de Edukado.net kaj konsultiĝos kun la kursgvidantoj.

Por fini la studojn necesos pretigi finlaboraĵon pri metodika temo, kies prezento kun la fina kompleksa (teoria kaj praktika) ekzameno okazos en septembro 2024. Aliĝantoj ricevos movadan-diplomon pri instruista trejnado.

La trejnado estas specialiĝo de la 3-jaraj postdiplomaj interlingvistikaj studoj, kio signifas, ke temas pri la plej altnivela instruista trejnado, responde al la universitataj programpostuloj, kun teoria bazo kaj praktiko.

Kondiĉoj: bona lingvoscio (min. B2, atestilo pri Esperanto-ekzameno estas bonvena) kaj baza kono de esperanta kulturo, krome finita mezgrada lernado (tipo de abiturienta ekzameno).


Partoprenkotizo: A-landoj: 300 EUR, B-landoj 150 EUR por unu semestro.

Por pliaj informoj kontaktu: [interlin@amu.edu.pl](mailto:interlin@amu.edu.pl) aŭ [ikoutny@amu.edu.pl](mailto:ikoutny@amu.edu.pl).

Limdato: 15.08.2023. La aliĝbutono troviĝas fine de la paĝo.

Elŝuteblaj informiloj kaj reklamiloj estas ĉi tie: <https://edukado.net/trejnado>.

## „Esperanto per rekta metodo”



La lernolibro „Esperanto per rekta metodo” jam aperis en 45 lingvoj: la angla (vd *surfote*), araba, armena, bulgara, ĉeĥa, ĉina, dana, finna, franca, germana, greka, hindia, hispana, hungara, indonezia, irlanda, islanda, itala, japana, korea, kroata, kurda, latina, latva, litova, luksemburga, nederlanda, norvega, persa, pola, portugala, brazila portugala, rumana, rusa, serba, slovakaj, slovena, sveda, taĝika, taja, tajvana, turka, ukraina kaj vjetnama (kaj ankaŭ nur en Esperanto). Vidu la recenzon pri ĝi en *uea.facila* – [https://mallonge.net/rekta\\_metodo](https://mallonge.net/rekta_metodo) de Anna Löwenstein, kiu gvidas laŭ la angla versio de la lernolibro retajn kursojn en Britio. La aŭtoro, Stano

Marček, pretas donaci (resp. kontraŭ libervola mondonaco) al diverslandaj kursgvidantoj retajn versiojn de la lernolibro en pdf-formato en iliaj lingvoj, por libera uzo en la retaj kursoj. Interesiĝantoj povas skribi al li: [redakcio@gmail.com](mailto:redakcio@gmail.com).

Utho Maier, direktoro de la Germana E-Biblioteko en la germana urbo Aalen ([https://eo.wikipedia.org/wiki/Germana\\_Esperanto-Biblioteko](https://eo.wikipedia.org/wiki/Germana_Esperanto-Biblioteko)), kunlabore kun Stano, kreis novan retan paĝon [mallonge.net/lernu](https://mallonge.net/lernu), en kiu estas libere elŝuteblaj la angla versio de la lernolibro en pdf, 500 Instruaj Bildoj por instruistoj en pdf kaj modele voĉlegitaj tekstoj de la lernolibro en mp3. (Krome tie troveblas pluraj materialoj pri la lernolibroj kaj metodikaj helpiloj de Stano Marček.)

## La danuba regiono refortigas sin – precipe pri kursoj

En marto, la landoj de la Danubo finfine renkontiĝis rete por kunlabori. Praktike, tiu kunlaboro signifas okazigi kursojn. SMG volontulis arigi informojn pri kursoj, ĉefe retaj, en la regiono. Ĝis nun mi havas raportojn el Serbio kaj Rumanio, kaj alvokas informojn de la pliaj balkanaj landoj (Bulgario, Hungario, Slovakio). La verkanto mem loĝas ene de unu

kilometro de Danubo. La regiono malfortis tra dudeko da jaroj, tre ĝojiga estas la nuna spontana revekiĝo. La regiono ja enhavas estraranon de UEA, s-inon Aurora Bute, kiu rolas kiel kontaktpunkto de UEA kun ILEI.

## **EKO-komunikoj servadas al ILEI**

Jam aperis dudek komunikoj en la nuna jaro. Ĝi regule konigas informojn pri ILEI, kiu dekomence estas partnero kun EKO. Informoj de ILEI por EKO ĉiam bonvenas, precipe se bone redaktitaj, maturaj por uzo. ILEI figuris en la komunikoj 1 (1-a de jan), 2, jan 4, (Juna Amiko), 7, 10, Feb 14, (VEKI), kaj 12. [NdlR: *por la komunikoj ni kreis rubrikon en la retejo de ILEI: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>*]

## **AMO-seminarioj sojlas je la centa**

Jam okazis 99 seminarioj kaj la centa okazos hibride en la 20-a de junio en Tiszafüred, Hungario. Ni jam sendis pli detalan demandaron en EKO 20 (apr. 7), por la reta diskutado, kies celo estas ĉefe planado por la estonteco. Ni nun provas organizi AMO-seminariojn AMO 101 (en Latvio) kaj AMO 102 (Italio, kun seminario en novembro antaŭvidita en Kroatio.) Aliaj proponoj bonvenas.

*Stefan MACGILL, Hungario*

## **INFORMOJ PRI ILEI**

### **Laborkomisionoj**

**Ekzamena:** Karine Arakelian (*prez., dumtempe pluservanta ĝis la venonta elekto*)

**Elekta:** Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.

**Kontrolo:** Simon Smits, Nvard Manveljan.

**Lerneja:** Julian Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.

**Regulara:** Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.

**Terminara:** Miroslav Malovec, Ilona Koutny.

**Universitata:** Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti, Gong Xiaofeng „Arko”, Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

### **Enmovadaj partneroj (entute 15)**

**E@I** (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, [info@ikso.net](mailto:info@ikso.net). Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>.

**Fondaĵo edukado.net** - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: [redaktanto@edukado.net](mailto:redaktanto@edukado.net).

**ICH** (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnseioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, [zsafia.korody@esperanto.de](mailto:zsafia.korody@esperanto.de).

**IEFEF** (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*

**TEJO** (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Fernando Pita**.

Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido**.

**UEA**: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando,

[www.uea.org](http://www.uea.org). Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi**.

Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters**.

**LIBE** (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. **Nedeljka Ložajić**, [nedeljkalozajic@gmail.com](mailto:nedeljkalozajic@gmail.com).

*kaj aliaj*

---

### **Ekstermovadaj partneroj (entute 8)**

**ALTE** (*Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo*) Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.

**FIPLV** (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*)

**UN** (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro**.

**Unesko** (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Alessandra Madella**, [a.madella@tiscali.it](mailto:a.madella@tiscali.it), **Didier Janot**, [didier.janot@gmail.com](mailto:didier.janot@gmail.com), **Emmanuel Desbrières** kaj **Maximiliano Garcia**.

*kaj aliaj*

---

### **Membreco kaj pagado por diversaj servoj**

**Membreco kostas 25 € en A-landoj kaj 12,50 € en B-landoj, kun ricevo de 4 paperaj kaj bitaj numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 12,50 € por la A-landoj kaj 6,25 € por la B-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €. Abono de JA papera (kune kun la bita) kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA bita kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. **Lando-kategorioj: B-landoj:** iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko, Ameriko (escepte de Usono kaj Kanado), Kiribati, Papuo-Nov-Gvineo, Solomonoj, Vanuatu en Oceanio. **A-landoj:** ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande.**

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al **Karine ARAKELYAN**, 33 Khandjian Str., Apt. 4, Erevan, 0010, Armenia, [ilei.kasisto@gmail.com](mailto:ilei.kasisto@gmail.com). Bv klare indiki la celon de via pago.

a) Pagoj al la nederlanda banko de ILEI: ING Bank N.V., kontonumero: 4676855, IBAN: NL55 INGB 0004 6768 55, BIC/SWIFT: INGBNL2A. Bonvolu aldoni 5 € por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo) kaj EU.

b) Pagoj al la sekciestro alvenos al ILEI kune kun tiuj de la aliaj membroj de la sekcio. Vi jam estas en la sekcia listo kaj ne devos mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon.

c) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Se vi ne mem posedas UEA-konton, por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (kontonumero: 378964; IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj.

Se vi ne estas en la sekcia listo, bonvolu mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon (aliĝilo: <https://www.ilei.info/Aligxilo.pdf>; abon-formularo por *Juna Amiko*: [https://www.ilei.info/Juna\\_Amiko.pdf](https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf)). Vian retaliĝilon sendu al la membro-prizorganto Hamzeh Shafiee: [hamzeho@gmail.com](mailto:hamzeho@gmail.com) kaj samtempe al ILEI-kasistino Karine Arakelyan: [ilei.kasisto@gmail.com](mailto:ilei.kasisto@gmail.com). Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

\* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

\* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).

\* Retpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

## REDAKCIAJ INFORMOJ

**Respondeca eldonanto** (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Torhoutsesteenweg 453/0003, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario*, [jozefo.nemeth@gmail.com](mailto:jozefo.nemeth@gmail.com), tel: (+36-70) 931-0530. Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena Poshivana, [olenaposivana@gmail.com](mailto:olenaposivana@gmail.com).

**Redaktora noto**: la ĝisnuna, limigita retejo de *IPR* (<https://www.ilei.info/ipr/>) baldaŭ ĉesos funkcii. Anstataŭ ĝi ni kreis pli ampleksan arkivon ene de la retejo de ILEI. Ĝia aktuala adreso estas <https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php>.

*Ni fermis la nunan numeron la 15-an de aprilo 2023,  
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aŭgusto 2023.*



*Kursfinintoj en la 8-a Afrika Kongreso (vd. p. 15)*



*Vjačeslav Ivanov kaj Espoir Kasati en Dakaro (vd. p. 15)*

